

# Resumo de la Marks'a Kapitalo

--- eltiraĵo ---

de Roza Luksemburg

En la unua volumo Marks pritraktas la ĉefan demandon de la politika ekonomio: De kie devenas la pliriĉiĝo, kie estas la fonto de profito? En la epoko antaŭ Karl Marks oni dudirekte respondis tiun demandon.

La "sciencaj" defendantoj de la plej bona el ĉiuj mondoj, en kiu ni vivas, viroj kiuj parte, kiel Schulze-Delitzch, ĝuis la respekton kaj konfidon ankaŭ de laboristoj, klarigis la riĉaĵon kapitalistan per tuta serio da pli malpli akcepteblaj kaŭzoj kaj ruzaj manipuloj: frukto de sistema prezaltigo de komercaĵoj por "kompensi" la entrepreniston por la kapitalo, kiun li noble "disponigis" al la produktado, kompenso por la "risko", kiun sur sin prenas ĉiu entreprenisto, rekompenco por "intelekta" direktado de la entrepreno, k.c. Laŭ tiuj klarigoj la riĉeco de la unuj kaj sekve ankaŭ la malriĉeco de la aliaj aperis kiel "ĝusta", kaj tial neŝanĝebla.

Kontraŭ tio la kritikantoj de la burĝa socio, la skoloj de la socialistoj antaŭmarksaj deklaris, ke la pliriĉiĝo de la kapitalistoj devenis el pura trompo, eĉ el ŝtelo farita de la kapitalistoj je la laboristoj, ebligata de interveno de la mono aŭ de la organiza maltaŭgo de la produkta procedo. El tiu vidpunkto tiuj socialistoj kreis diversajn projektojn utopiajn celante la forigon de la ekspluatado per forigo de la mono, per "organizo de la laboro" kaj per similaj receptoj. Marks malkovras en la unua volumo de la *Kapitalo* la realan radikon de la kapitalista pliriĉiĝo. Li klopodas nek pravigi la kapitalistojn, nek akuzi ilian maljustecon: li unuafoje montras kiel naskiĝas la profito kaj kiel ĝi fluas en la poŝojn de la kapitalistoj. Tion li klarigas per du decidaj faktoj ekonomiaj: Unue per la fakto, ke la plejmulto de la laboristoj estas proletoj devantaj vendi sian laborforton kiel komercaĵon, kaj due, ke tiu komercaĵo *laborforto* nuntempe posedas tiel altan gradon da produktiveco, ke dum certa tempo ĝi kapablas krei produktaĵon multe pli grandan ol ĝi bezonas por sia propra konservo dum la sama tempo. Tiuj du faktoj pure ekonomiaj kaj de objektive historia evolucio donitaj agas tiel ke la frukto

kreita per la laboro de la proleto aŭtomate falas en la manon de la kapitalisto kaj mekanike amasiĝas je des pli kaj pli grandega kapitalriĉaĵo, ju pli longatempe daŭras la dunga sistemo.

Marks klarigas la kapitalistan pliriĉiĝon nek kiel kompenso de la kapitalisto por fantaziaj oferoj kaj bonfaroj, nek kiel trompo kaj ŝtelo laŭ la kutima senco de tiuj vortoj, sed kiel laŭjure tute legala interŝanĝa afero inter kapitalisto kaj laboristo, sekvante la samajn leĝojn kiel ĉiu alia aĉeto kaj vendo de komercaĵoj. Por ĝisfunde klarigi tiun senmakulan aferon, kiu portas orajn fruktojn al la kapitalisto, Marks devis finlabori kaj apliki je la komercaĵo *laborforto* la leĝon pri la valoro (t.e. klarigo de la internaj leĝoj de la interŝanĝo de komercaĵoj), starigita de la grandaj anglaj klasikuloj Smith kaj Ricardo. La leĝo pri la valoro, el kiu deriviĝas la salajro kaj la supervalor: la klarigo kiel la produktaĵo de la dunga laboro dividiĝas mem, sen ia perforta trompo, en mizeran viveblaĵon por la laboristo kaj senlaboran riĉaĵon por la kapitalisto, jen la ĉefa enhavo de la unua volumo de la *"Kapitalo"*. Kaj jen la granda signifo historia de tiu libro: ĝi pravas, ke la ekspluatado povas esti forigita nur per forigo de la vendo de la laborforto, alivorte per forigo de la salajra sistemo.

En la unua volumo de la *"Kapitalo"* ni troviĝas la tutan tempon en la laborejo: en fabriko, minejo aŭ moderna entrepreno kampokultura. Tio, kion Marks tie klarigas, valoras por ĉia kapitalista entrepreno. Estas pritraktita nur la individua kapitalo kiel tipo de la tuta produktmaniero. Ferminte la volumon ni klare konas la ĉiutagan naskiĝon de la profito; la mekanismo de la ekspluatado estas tralumigita ĝis la profundaĵo. Antaŭ ni kuŝas monto de komercaĵoj ĉiuspecaj ĵus elvenintaj el la laborejo ankoraŭ malsekaj je la ŝvito de la laboristoj, kaj en ĉiuj komercaĵoj ni kapablas akre distingi la valorparton, kiu devenas el nepagata laboro de la proleto, kaj kiu same prave kiel la tuta produktaĵo estas posedaĵo de la kapitalisto. Ni propramane palpas la radikon de la ekspluatado.

Sed la rikolto de la kapitalisto ankoraŭ tute ne estas engarbejigita. La frukto de la ekspluatado ekzistas, sed ĝi troviĝas en formo nekonsumebla por la entreprenisto. Tiel longe kiel li

ĝin posedas nur sub formo de komercaĵoj amasigitaj, la kapitalisto ne povas tiri profiton el la ekspluatado. Li ja ne estas la sklavestro de la greka-roma mondo antikva, nek la feŭda kastelestro de la mezepoko, kiuj premegis la laborantan popolon nur por sia propra kaj por kortega luksoj. La kapitalisto bezonas sian riĉaĵon en sonanta mono aplikota krom por "konvena vivmaniero", por senĉesa pligrandigo de la kapitalo. Por tio estas necese vendi la komercaĵojn --kun la supervaloro en ili entenata-- produktitajn de la salajrulo. La komercaĵo devas esti transportata de la fabrika deponejo kaj de kampara staplo al la merkato; la kapitalisto ĝin sekvas de la kancelario al la borso, en la magazenon, kaj tie ni sekvas lin en la dua volumo de la *"Kapitalo"*.